



ESPERO KATOLIKA

KARAJ LEGANTOJ.

La nederlanda Oficejo „Esperanto en la Instruado” kolektis subskribojn por petskribo, prezentota al la koncerna Ministerio dum la pritrakto en la Parlamento de la leĝo pri la instruado. Kelkaj lerneaj infanoj je 16.5.'60 prezentis la petskribon akompanatan de 812.000 subskriboj. La menciita Oficejo, en kiu konstante kunlaboras la diversaj landaj ligoj de esperantistoj kaj de instruistoj petas la enkondukon de Esperanto en la elementajn lernejojn, kiel devigan aŭ kiel fakultativan fakon, kaj la egaligon de la instrudiplomo de Esperanto kun tiu por aliaj lingvoj.


Ni tre esperas, ke la Parlamento, kiu antaŭ kelkaj jaroj malŝavore decidis pri la sama peto nur pro manko de kelkaj voĉoj, ĉiŝoje plenumos la ardan deziron de ni, esperantistoj. Sed kiel ajn estu la decido: certe jam estas tempo por prepari nin. Nia afero nuntempe ĉie troviĝas en la centro de la publika intereso; precipe pro la faktoj, ke la grava UNESKO estas ŝavora al Esperanto kaj ke U.E.A. komencis novan agadon por vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj, ĉi tiu temo certe estos pritraktata en la parlamentoj, komunumaj kaj lerneaj estraroj de multaj landoj. Post ĉiu ŝavora decido oni bezonos aron da kompetentaj geinstruistoj, kaj tial jam estas urĝa tempo, ke ni, kaj precipe la profesiaj instruistoj en nia movado, pliprofundigu sian scion de nia lingvo kaj akiru la instruan diplomon. Ĉar estus hontiga fakto, se en unu aŭ pli da lernejoj post akiro de la oficiala permeso ne povus komenciĝi la instruado, pro manko de kompetentaj instruistoj! Kaj tial ankaŭ ni ĉiuj devas ŝari propagandon por varbi instruistojn por nia movado, por ke en ĉiu lando troviĝu sufiĉe da ili je la momento, ke Esperanto estos leĝe preskribita aŭ almenaŭ allasita en la lernejaj programoj.

Mi profitas la okazon por denove instigi ĉiujn niajn membrojn al plibonigo de sia scio de Esperanto: ankoraŭ ekzistas tro multe da esperantistoj kun nur tre elementa scio de nia tamen relative tiel ŝavila lingvo; ankaŭ ni havas tro multe da „eternaj komencantoj”. Ekzistas diversaj rimedoj: gramatika studo, memstare aŭ pere de kurso; legado de libroj kaj revuoj; dum klubkunvenoj aŭ ĉe renkonto de eksterlandaj s-anoj kuraĝa babilado.... Se vi ne havas kontakton kun aliaj esperantistoj, vi povas kontroli vian prononcon aŭskultante radio-elsendojn en Esperanto aŭ pere de la speciala gramofondisko, kiu por nur 3,30 guld. aŝrankite (14 steloj) estas havebla ĉe nia Libro-Servo. Vi certe neniam bedaŭros la penadojn, kiujn vi ŝaros por la akiro de pli bona scio de nia lingvo!

Truus Durenkamp.

JUBILEO-DONACOJ, RICEVITAJ ĜIS 15.5.'60:

Antaŭa sumo: f 42,75; Nederlando: f-ino A. M. en G. f 2,50; f-ino L. M. N. en A. f 1,20; Germanujo: A. K. en W. f 3,60; Francujo: E. T. en St. E. f 3,75; entute 53,80 ned. guld. Koran dankon al la donacintoj!



Kvara Mondkunveno
de katolikaj esperantistoj en la kadro de la
XXXVIIa EŬKARISTIA
MONDKONGRESO en **MUNKENO**
de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1960.

Dekdua Bulteno de la L.K.K.

Evidente diversaj aliĝintoj miskomprenis pri la pago, aŭ pensis, ke ili poste povos pagi en Munkeno. Sed ili pripensu, ke nia L.K.K. havas multegajn kostojn por ĉion aranĝi, elspezojn por presaĵoj, afrankoj ktp. kaj ke sen mono ankaŭ ni nenion povas fari. Tial ni denove atentigas, ke ĉiu kiu ĝis nun ne pagis sian aliĝilon por la IKUE-aranĝoj, devas ankoraŭ pagi sumon de 20,— gmk. (= 72 steloj); en tiu sumo estas 5,— gmk. kiun nia LKK pagas al la Eŭk. Kongreso kiel parton de la enirkartoj por la kongres-ceremonioj, muzeoj, ekspozicioj ktp. kio entute kostas 20,— gmk.; do kiu ankoraŭ ne pagis tion, devos krome ankoraŭ pagi 15,— gmk. (vidu la 11-an bultenon en la antaŭa EK-numero). Por la loĝado kaj matenmanĝo: ĉambroj 6 gmk. ponokte p.p.; amasloĝejoj: 2,— gmk. ponokte p.p. plus 17,— gmk. kiel garantio por la kauĉuka matraco, kiun sumon oni ricevos je la foriro. Ni urĝe petas, ke ĉiuj plenumu sian devon, por ke *ni* povu plenumi nian taskon!

La tuta urbo Munkeno nun bruas pro la preparaj laboroj: ne nur oni laboregas en la oficejoj de la 23 komisionoj, kiuj devas aranĝi ĉion por tia giganta kongreso, sed jam dum pli ol jaro tage kaj nokte 250 laboristoj okupas sin konstruante vojojn kaj pontojn por la trafiko, ĉar krom la 200.000 veturiloj kiuj ordinare moviĝas en la urbo, dum la kongreso miloj da aliaj bezonos spacon en la trafiko!

Oni nun ankaŭ estas konstruanta sur la 1000 m. longa kaj 500 m. larĝa Teresa-herbejo en la centro de la urbo, la grandegan altaron kiun ni priskribis en nia deka bulteno. Inter krampoj: ni urĝe rekomendas al niaj kongresanoj, kunporti binoklon, por pli bone povi sekvi la ceremoniojn per la okuloj (laŭtparoliloj portos la sonojn al ĉies oreloj!) kaj por povi distingi resp. rekoni la diversajn altrangulojn. Por ke la miloj da sacerdotoj havu okazon, celebri la S. Meson, por kio eĉ la multaj preĝejoj kaj monaĥejoj ne sufiĉos, oni preparas 236 porteblajn altarojn kun kalikoj, mesvestoj kaj ĉiuj bezonataj paramentoj; post la fino de la Kongreso ĉio estos sendata al la Misioj.

El la hispana urbo *Villarreal*, kie naskiĝis la Patrono de la Eŭkaristiaj Kongresoj, sankta *Paskalo Bajlono*, venos la postrestaĵoj de tiu sanktulo, akompanataj de la episkopo de *Tortosa*, la distriktestro kaj la urbestro de *Villarreal*.

En preparo estas kopio de la hispana filmo „La Misteroj de la Rozario”, grandega ekspozicio pri 1400 jaroj da kristana vivo en Bavarujo, ktp.

La ceremonioj de la Eŭkaristia Kongreso, vizito de ekspozicioj kaj aliaj vidindaĵoj, kaj cetere la IKUE-aranĝoj: kunvenoj, ekskursoj ktp. certe zorgos, ke niaj partoprenontoj ne bezonos enui!

Ĝis la 10-a de majo anoncis sin por la IKUE-aranĝoj 180 personoj el 13 landoj: Anglujo 1, Aŭstrujo 13; Belgujo 4; Brazilo 1; Francujo 11; Germanujo 100;

NI GRATULAS

S-ro H. F. J. Wansink, St. Walburgisplein 6, *Arnhem, Nederlando*, festos 22.6.'60 sian 70-an naskiĝtagon. Li esperantistiĝis en 1931, estis lernanto de la famaj samideanoj Heilker, Bulthuis kaj Pragano. La instruistan diplomon por Esperanto li akiris en 1933. Ekster sia laboro kiel prokuristo-ĉeflibrotenisto li gvidis kursojn por poŝtistoj, lokis multajn propagandajn artikolojn en la nederlanda gazetaro, tradukis, parolis antaŭ la radio dum propagandaj elsendoj, ktp. Ni kore gratulas nian viglan membron kaj deziras al li ankoraŭ multajn feliĉajn jarojn. *



Geedziĝis 23.4.'60 en la preĝejo de Sankta Bruno, *Kolonjo, Germanujo*: Bruno Knapstein kaj Barbara Hierholzer. Ni kore gratulas niajn membrojn kaj deziras al ili sunoplenan vivovoĵon. Adreso: Lindenstr. 4, *Hürth*. *

La Konstanta Kongresa Sekretario de U.E.A., *Gian Carlo Fighiera* edziĝis 20.4.'60 al *Ada Sikorska*, Redaktorino de la Pola Radio por la dissendoj en Esperanto. Korajn gratulojn kaj bondezirojn al la internacia paro! *

Nia membro *Oleĥ Szczepaniak*, en *Gutowo Mate*, p. Wrzesnia, w. Poznanskie, *Polujo*, ricevos la sanktan Ordinon 12.6.'60. Niajn varmajn gratulojn ni sendas al la nova sacerdoto kun la preĝo, ke Dio benu kaj fortigu lin por lia respondeca tasko. *

La simpatia redaktoro de nia junulargazeto *BIRDO*, *Jacques Tuinder*, fianĉiĝis je Pasko al s-anino *Dievera Dekker*. Persone ni jam alportis niajn bondezirojn, dum kiu vizito ni vidis grandan amason da gratulleteroj, kartoj kaj telegramoj el preskaŭ la tuta mondo; ankoraŭfoje, kaj nun certe en la nomo de ĉiuj niaj membroj, ni deziras al la juna paro feliĉan voĵon al la geedziĝo.

PRETERIRIS DIO

Profesoro *Clot Bey*, la unua kiu en Egiptujo estigis medicinan fakultaton, iris kun kelkaj el siaj lernantoj promeni en Marsejlo tra homplena strato, kiam proksimiĝis sacerdoto kun la plej sankta Sakramento. Clot Bey haltis kaj profunde riverencis.

Unu el la junaj medicinistoj alparolis lin demandante, kial li faris tian riverencon. „Preteriris Dio”, simple li respondis. „Kiel? Ĉu vi kredas, ke la Ĉiopotenculo povus esti en la manoj de sacerdoto?” — „Jes, mi kredas tion; vi konas nur Lian potencon, sed ne Lian amon”.

(Koch: *Homiletisches Quellenwerk*)

Hispanujo 14; Irlando 1; Italujo 4; Jugoslavujo 1; Nederlando 23; Polujo 6; Svisujo 1. Inter ili estas 20 sacerdotoj.

Atentu! Sur la aliĝilo la kontonumero de la banko ne estas ĝusta, b.v. legi: *Bayer. Hypotheken- und Wechselbank, 9-15 Theaterstr. München 2, Germanujo, konto n-ro 371 100.*

LASTA NOVAĴO: Laŭ nia urĝa peto la E.K.K. retenos kelkajn ĉambrojn en *Gräfelfing* ĝis 15.6.'60 por personoj kiuj ne povis pli frue anonci. Interesatoj do tuj ensendu aliĝilon kaj pagon al: *f-ino H. Zöschinger, Ruffinistr. 7, München 19, Germanujo.*

ASTRONAŬTIKO KAJ EKLEZIO.

El la parolado de Lia Papa Moŝto Pio XII al la partoprenantoj de la Internacia Astronaŭtika Kongreso en Romo 1956.

Sendube por ĉiuj partoprenantoj de la kongreso la aŭdienco ĉe Lia Papa Moŝto Pio XII-a en *Kastelo Gandolfo* la 20-an de Septembro 1956 estis okazaĵo, kiu certe al neniu permesos forgesi la Internacian Astronaŭtikan Kongreson en Romo. La papo direktis al la partoprenantoj sufiĉe longan paroladon en franca lingvo, de kiu tie ĉi en libera traduko kaj resume estu represataj la unuaj vortoj kaj la fino. La parolado mem estas publikigita en *L' Osservatore Romano* de la 22-a de Septembro 1956.

„Okaze de la Sepa Kongreso de la Internacia Astronaŭtika Federacio, kiu kunvenigis vin ĉi tiun jaron en Romo, vi, sinjoroj, esprimis la deziron, interrilatigi Nin iel kun la evoluo de viaj laboroj. Pri tio Ni estas tre feliĉaj kaj Ni esprimas al vi Nian admiron por la konvinko, la obstino kaj la kuraĝo de ĉiuj, kiuj de post duona jarcento paŝon post paŝo esploras tiu ĉi vastan kampon.

Fakte la laiko, kiu la unuan fojon okupas sin pri la aktiveco kaj la celo de via societo, certe estos surprizita. Jam sole la vorto astronaŭtiko altrudas la penson pri utopiaj vojaĝoj tra kapturaj spacoj en teruraj cirkonstancoj por la homo elŝirita el sia natura ĉirkaŭaĵo!”

Post pritrakto de la evoluo de la astronaŭtika scienco kaj de la rezulto de la ĝistiamaj kongresoj la Papo plue diris je la fino de sia parolado:

„Ne volante pli precize priparoli detalojn, vi certe konscias, ke projekto de tia amplekso enhavas intelektajn kaj moralajn vidpunktojn neeble pretervideblajn. Ĝi postulas certan imagon pri la mondo, ĝia senco kaj ĝia finebleco. Dio, la Sinjoro, kiu metis en la koron de l' homo la nesatigeblan lernemon, ne havis la intencon, limigi lian konkeremon, kiam Li diris al li: „Subigu al vi la teron” (Gen. 2.28). Estas la tuta kreitaĵo, kiun Li konfidis al li kaj kiun Li prezentas al la homa spirito, por ke ĝi trapenetru ĝin kaj tiel ĉiam pli funde komprenu la senfinan grandecon de sia Kreinto. Ĝis nun la homo tiel dire sentis sin katenita al la tero kaj devis kontentiĝi kun fragmentaj informoj venantaj al li el la universo; sed nun ŝajnas, ke prezentiĝas al li la ebleco trarompi ĉi tiun baron kaj atingi novajn verojn kaj ekkonojn, kiujn Dio en superfluo enmetis en la mondon. La solaj progresemo, sciemo kaj aventuremo neniam sukcesos, ĝuste direkti tiujn fortojn. La novajn situaciojn kreitajn de la intelekta evoluo de l' homaro devas prijuĝi la konscienco; la homo devus pliprofundigi sian scion pri si mem kaj pri Dio, por povi pli precize enordigi sin en la tuton de la mondo, por pli bone ekkoni la gravecon kaj la konsekvencojn de siaj agoj. Ĉi tiu komuna klopodado de la tuta homaro por paca konkero de l' universo devas kontribui por pli enpremi en la konscienco de la homoj la sencon de la komuneco kaj de la solidareco, por ke ĉiuj pli forte havu la impreson formi la familion de Dio, esti infanoj de sama patro. Sed por tute koncepti la verecon, estas same necesaj respekto al la vero, subordiĝo sub la efektivecon kaj kuraĝo, kiel scienca laborado. La plej kuraĝaj esploradoj pri la universo nur servus al la kaŭzado de novaj malharmonioj inter la homoj, se ili ne kun pli profundigita morala prijuĝo kaj pli konscia teniĝo de l' sindono estas kunordigataj al la pli altaj interesoj de l' homaro.

Ni forte deziras, ke la estanta kongreso sukcese vin progresigos sur via ankoraŭ longa kaj malfacila vojo, kaj Nia speciala deziro estas, ke la pleneco



NORVEGIJO. La Katolika Informejo de Oslo aranĝis modernan, tre originalan servon por instrui la religion en izolitaj lokoj, precipe dumvintre en la montaro, nome per magnetofonbendoj. Baldaŭ ekzistos granda biblioteko de bendoj kun kateĥismo-lecionoj kaj ĉiuspeca religia instruo.

MALTO. De la 31.1. ĝis 24.7.'60 oni celebras la fakton, ke antaŭ 19 jarcentoj Sankta Paŭlo pro ŝiprompiĝo alboridiĝis sur la insulo Malto. Inter 3-24.7. okazos la kulmino de la festo, kiun ĉeestos pluraj kardinaloj kaj proksimume

40 episkopoj, inter aliaj la kardinaloj Ruffini, Godfrey kaj Spellman. La kardinalo-legato alvenos surborde de brita militŝipo. El multaj landoj venos pilgrimoj.

ITALIJO. En *San Remo* ĉi-jare regule okazas, je iniciato de katolikaj intelektuloj kaj kun permeso de la episkopo, renkontoj inter katolikoj, luteranoj, valdensoj, anglikanoj kaj ortodoksaj kristanoj. Dum la kunvenoj reprezentanto de ĉiu religio laŭtlegas fragmenton el la Sankta Skribo laŭ interkonsenta aranĝo, post tio oni kune recitas kvar psalmojn. Ĉi tiuj ekumenaj kunvenoj vekis grandan intereson en religiaj rondoj kaj rikoltas la kontenton de la partoprenantoj.

NIKARAGVO. En la urbo *Managua* estos fondata universitato laŭ la modelo de tiaj institucioj en Eŭropo. Oni unue instalos la fakultatojn de juro, de administracia scienco, kaj de ekonomio kaj komerco, poste sekvos medicina kaj filozofia fakultatoj. La tuto estas konfidata al la zorgoj de la Jesuitoj de la provinco Nikaragvo.

(Informservo de „Mondo Migliore, Romo”).

KAMERUNO fariĝis antaŭ nelonge memstara ŝtato; la nombro da katolikoj estas 607.300 (mohametanoj 625.000, protestantoj 350.000, paganoj animismaj 1.617.700). La unuaj katolikaj misiistoj alvenis en 1890. Nun ekzistas la ĉefdiocezo *Yaoundé* kun 5 diocezoj kaj unu apostola prefektujo; laboras tie 273 sacerdotoj kaj 214 religiulinoj. Ekzistas 1299 katolikaj lernejoj — pli ol la duono de ĉiuj — kun 79.634 lernantoj.

VATIKANO. En la baziliko S. Johano de Laterano 10 studentoj de la Beda-Seminario por malfruaj alvokoj en Romo ricevis la sanktan Ordinon; kvin el ili antaŭe estis anglikanaj pastroj: paroĥestro, tri vikarioj kaj monaĥo; la ceteraj: 42-jara advokato, 63-jara aŭstraliano, 44-jara profesoro de la universitato de *Kingstown, Jamaiko*, 46-jara skoltestro kaj 68-jara vidvo.

de la spiritaj malkovroj, kiuj estas ĝia principo, ne estu malpli signifa ol ĝia scienca ekkono.

Petegante por vi la protekton kaj la favoron de Dio, kiu kreis la universon por la homoj kaj kiu per tio volas esti ekkonata kaj amata de ili, Ni donas al vi kiel garantiaĵo por vi mem, por viaj familioj kaj viaj kunlaborantoj Nian apostolan benon.”

Traduko el: *Karl Schütte „Die Weltraumfahrt hat begonnen“*
eldonejo Herder, Freiburg.

ESPERANTO VIVAS



ol mil eksterlandaj firmoj. La areo de 102.000 kv.metroj donas lokon al la industrio de ĉiaj fakoj kaj multaj specialaĵoj, pri kiuj oni aranĝas kunvenojn kaj intern. kongresojn kun apartaj studoj, elprovoj ktp. Adreso: Fiera di Padova, Stampa e Propaganda, Padova, Italujo. *

AŬSTRUJO. La baroka urbo *Salzburg*, kiu preskaŭ sendifekte transvivis ĉiujn okazintaĵojn de la historio, denove eldonis belegan, multkolora ilustritan prospekton en Esperanto. Ne nur dum la ĉiujara muzikfestivalo la Mozarturbo kaj mirindaj ĉirkaŭaĵoj meritas viziton, sed ili estas interesaj dum ĉiuj sezonoj. Petu la senpagan broŝuron ĉe: *Urba Trafikoficejo, Salzburg*. *

FRANCUJO. La 52a Nacia Kongreso de Esperanto okazos de 4-6 junio en Montélimar. Oni kompilis tre interesan programon: ne nur okazos estrar- kaj jarkunvenoj de la Franca Esp. Ligo kaj kunveno de UEA-delegitoj, sed ankaŭ diversaj ekskursoj, protestanta kaj katolika diservoj, festvespero kaj eĉ balo. *

S-ro Doyelle en Bourbourg instruas Esperanton al lernantoj de katolikaj lernejoj. Li intencas viziti la kongreson en Munkeno kun grupo de siaj lernantoj, aŭtobuse. *S-ro Barrier en Parizo* klopodas organizi ĝemeliĝon de la pariza kaj bavara grupoj de *Pax Christi* kaj havas bonan esperon por la sukceso. Celo: korespondado en Esperanto; aperigo de artikoloj pri ambaŭ landoj por pli bona interkonigo; reciprokaj vizitoj. Ni deziras al nia vigla franca sekcio grandan sukceson.

HISPANUJO. La 21a Hispana kongreso de Esperanto okazos de 21-23 julio en Pontevedra. Eksterlandanoj ne pagos aliĝkostojn. Okazos ankaŭ infankongreseto. Junularorganizo senpage disponigos sian tendarterenon por kiuj venos kun tendoj. Informoj: S-ino Concepción Menlle, C. Michelena 16, 4°, Pontevedra, Hispanujo.

En la urbo *Gijón* okazis en decembro 1959 grandega gazetar-ekspozicio pri en-kaj eksterlandaj gazetoj. Unu salono estis dediĉata al la Esperanto-gazetaro, multnombra kaj tre varia kolekto. Magnetofono parolis en Esperanto. La propaganda sukceso estis eksterordinara: la loka ĵurnalaro detale okupis sin pri tiu Universala Gazetara Ekspozicio kaj pri ĝia kaŝita celo, Esperanto, tre taŭge montrita. *

GERMANUJO. Nia senlaca reprezentanto, s-ro Hans Stahl, instruas nian lingvon al komencantoj en la popolaltlernejo de *Weiden*. *

KANADO. S-ino *Dorothy Vincent* verkis artikolon por la gazeto „Globe and Mail”, kiu vekis grandan interesiĝon kaj multajn informpetojn. Instruisto en *Don Mills* apud *Toronto* laŭtleĝis la artikolon en sia klaso kaj profesoro de la Universitato en *Toronto* uzis ĝin kiel bazon por prelego. — Propagando de *ges-roj Eichholz* en *Oakville* rezultigis kurson kaj lokan grupon. — Ankaŭ en *Rose Valley* estas kurso sub gvidado de *Christie Roberts*. *

BRAZILIO. La Instituto por estontaj instruistinoj ĉe la kolegio „Bom Pastor” en Chapecó (Santa Catarina), Esperanto povas esti instruata nedevige.

En la pasinta jaro, en la supra lernejo, oni studis Esperanton, post la fino de la lecionoj, dufoje semajne. Ĉar la libroj alvenis malfrue, kaj pro kelkaj aliaj okazintaĵoj oni ne sukcesis atingi la celon: ebligi al la lernantinoj fari la ekzamenon por ricevi la Norman Elementan Diplomon. Sed ĉijare oni rekomencis pli bone. *Esperanto* estas inter la aliaj oficialaj lernobjektoj. Merkrede kaj vendrede, de la 14,15 ĝis la 14,50 ĉiuj lernantinoj de la tri (3) klasoj samtempe partoprenas la Esperanto-kurson. La ĉeeston de la lernantinoj kaj la lecionojn donitajn la instruisto registras en oficiala taglibro de la lernejo. Antaŭ la fino de la lernojaro la lernantinoj faros ekzamenon por ricevi la Norman Elementan Diplomon de la Brazila Esperanto-Ligo.

La lernejo estas privata entrepreno de franciskanaj monaĥinoj. Ne la instruisto enkondukis la kurson de Esperanto sed la Direktorino mem: *Madre Maria Ancila*. Kaj la kurson partoprenas ankaŭ *Fratino Maria de Lourdes*, instruistino de portugala lingvo kaj geografio.

La instruisto de la kurso, S-ro *Gersi Alfredo Bays*, fervora kaj lerta esperantisto, laboras dum la tuta tago en la lernejo (gimnazia fako) instruante fremdajn lingvojn (anglan, francan, latinan kaj nun Esperanton).

La foto montras klason; ni esperas ke inter la lernantinoj troviĝas estontaj membroj de IKUE.



La Internacia Katolika Informejo donas senpage informojn al nekatolikoj kaj sendas al ili sian dumonatan gazeton „Vojo, Vero, Vivo”. La katolikoj bonvolu subteni tiun belan apostolaton per mondonacoj kaj/aŭ abono je V.V.V. kies abonprezo estas 2,50 ned. guld. = 10 steloj jare. Nederlandanoj pagu al la Sekretario de I.K.I. Gasthuisstr. 68, TILBURG, poŝtkonto 268507. Por eksterlandanoj la adreso estas: Sac. H. Roosen, Redaktoro VVV, Huize „St. Gerlach”, *HEER (L)*, Nederlando, poŝtkonto 134120. Ĉiam indiku por kiu celo via pago estas destinita. La landaj reprezentantoj de IKI kaj eventuale la reprezentantoj de IKUE/E.K. volonte akceptos pagojn.



8. *Volkskrant* (Ned.) 28/4 '56. La ĉefministro (*Ant. Eden, Angl.*) sur la vizaĝo portis la klarajn post-signojn de la penigaj intertraktadoj kun ŝtatestroj (*Bulganin kaj Krutĉov*), kiuj parolas fremdan lingvon.

9. *Volkskr.* (Ned.) 17/8 '56, La disputo en la Londona konferenco pri la Suez-kanalo estas ekaĉiĝonta en batalon pri (unu) vorto. La homoj kiuj pri tio plejege turmentiĝas estas la tradukistoj kaj interpretistoj. Temas pri la vorto „control” en angla lingvo kaj „contrôle” en franca, la du plej uzataj lingvoj en la konferenco. Tiuj ĉi vortoj ĉe la tradukistoj kaj interpretistoj estas konataj kiel „malamikaj amikoj”. Ili havas tute diferencajn signifojn, kvankam ambaŭ havas la saman sonon.

Mia demando: Ĉu inter la legantoj estas lingvistoj, kiuj povas indiki ankoraŭ aliajn tiajn vortojn? Sendu!

10. *Maasbode* (Ned.) 13/10 '56: La lingvon de la eksterlandaj trafiksignoj oni multfoje tre malfacile komprenas; kaj en multaj kazoj oni malhavas en la rapida trafikfrento la okazon peti informojn. Sur tiu ĉi tereno regas ankoraŭ babilona konfuzo de lingvoj.

Mi mem vidis ie grandegan trafiktabulon kun instrukcioj, mi kredas, en kvar aŭ kvin lingvoj. Tiaj tabuloj estas danĝero por la trafiko, ĉar aŭtomobilistoj devas halti por povi iomete legi (kaj kompreni?)

11. En *Leidse krant* (Ned.) 28/11 '55 mi legis: *Arbitracianto kun interpretisto*. En la konkurso de la dekunuoj de Anglujo kaj Hispanujo la 30an de nov. '55 la franca arbitracianto *Maurice Guigue* uzos la helpon de interpretisto. Tiu ĉi stariĝos ĉe unu de la flanklinioj por transdoni eventualajn instrukciojn de la arbitracianto. Tiun aranĝon oni faras kaŭze de la piedpilkkonkurso *Wales-Aŭstrujo*, kiu malbeliĝis per multaj incidentoj kaj je kiu la franca arbitracianto *Fauquemberghe* ne povis sin fari komprenebla por la ludantoj kaj tiuj ĉi ne povis sekvi liajn instrukciojn.

12. *Sursum corda*, eklez. ĵurn. *Leiden* (Ned.) 15/9 '56 rubr. „ĉu vi sciis?": ke nuntempe en *Vieno* (*Austr.*) oni povas pekconfesi en 22 lingvoj?

Mia resp.: Mi ne sciis; tre facile: kiam venos al mi iu ruso aŭ ĉino aŭ armeno k.t.p. mi sendos lin al *Vieno* (1200 K.M. de tie ĉi), aŭ eble li parolas esperanton, kaj tiam mi povas helpi lin...

13. La „malfeliĉ-nombro”) Por tiu mi rezervis la anoncon de sro *Kronshage*, kiu en la antaŭa numero liveris tiel valorplenajn faktojn; leginte artikolon en „*Fährmann*” (kat. porjun. rev.) jan. '60 pri la Eŭkaristia Mondkongr. 1960:

„... Gasto el transoceanaj landoj laŭeble ricevu en Munkeno loĝejon. Por eviti la lingvajn malfacilaĵojn oni planas kunmeti fokuse la unuopajn lingvo-grupojn; eble la scipovantojn de la angla lingvo en la nordo de la urbo, la scipovantojn de la hispana lingvo en la sudo”, li 25/1 '60 skribis al la redakcio; la 23/3 li ricevis respondon, i.a.: „Mi dankas al vi pro la materialo pri Esperanto. Kvankam ĉi tiu lingvo ja per multaj publikigaĵoj... estas sufiĉe konata, tamen oni miras, ke ĝi tiel malmulte akceptiĝas.”

Petinte la Eklezian Gazeton de Wuppertal informi la legantaron pri E-kurso, kiun li estis stariginta en la Popolaltlernejo, sro *Kronshage* ricevis tiun ĉi respondon: „Estas certe ne necese atentigi je tio, ke en la „katolika spaco” estas

tute ne nur jesantoj de la artefarita lingvo Esperanto. Ankaŭ en tio kuŝas (certa) malfacilaĵo pledi por Esperanto." Komentario superflua!

14. (*Volkskr.*) 13.5.'60. Krutšov diris: „Vi komprenos, ke tia fakto povus konduki al milito.” Komence la korespondantoj komprenis el la traduko de la interpretisto, ke K. estis dirinta: „Ankoraŭ unu tia flugo, kaj la rusa puno por ĝi signifos milito.”

Ankaŭ ekzistis miskompreno pri la vortoj de K. kiam li diris: „La amerikanoj ankoraŭ neniam travivis militon sur sia teritorio, sed se Usono volas eksplodigi militon, ni estos devigataj, forpafi raketojn, kiuj eksplodos en la unuaj minutoj de la milito sur la teritorio de la atakinto.” La korespondantoj estis komprenintaj de la interpretisto, ke K. diris: „Se ili ankoraŭ neniam vidis eksplodi atombombon sur sia teritorio, ili travivos tion dum la unua minuto de la milito.” — Ni ne okupas nin pri la politiko, sed mencias tiujn erojn el ĵurnalistaj raportoj por pruvi la danĝeron de tradukoj en tiaj gravaj aferoj, malgraŭ la cetere kompetentaj interpretistoj!

Karaj legantoj, pri la faktoj, kiujn mi ĉi tie anoncas, plejofte mi lasos la konkludojn al vi mem. Kion mi trovis aŭ (mi esperas multnombre!) ricevis mi donos diverskolora kaj ne-aranĝite; vi mem povus kolekti la faktojn en diversaj rubrikoj: religio, sporto, trafiko, politiko k.t.p.

Plurajn sendaĵojn volonte ricevos *sac. C.A.Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.*

MARIA PLAIN APUD SALZBURGO.



Miraklobildo: Maria kun la Kristinĉano. Ambaŭ figuroj surhavas orajn kronojn. Ĉiujare 26.000 S. Komunioj. Pri la pilgrimadoj zorgas la Benediktanoj de la ĉefabatejo S. Petro en Salzburgo.

Furiozis la sveda milito en la germanaj landoj. La foirvilaĝo Regen en Bavarujo estis 1633 rabo de l' fajro. El sub la ruinaĵoj de la domo de la bakisto *Paŭlo Regner* oni tiris la madonbildon, kvazaŭ mirakle nedifektitan. *Baronino Argula von Griming* aĉetis la bildon kaj transportis ĝin al Salzburgo. Ŝia filo *Rudolfo* portis ĝin en 1652 sur *Plainberg*, devis ĝin baldaŭ forpreni, sed tie lasis kopion. La originalon li kunportis al Bavarujo kaj ĝi fine venis al la episkopa

palaco en *Aŭgsburgo*, kie oni ĝin zorge konservis.

Unue estiĝis malgranda, poste pli granda kapelo, fine ĉefepiskopo *Max Gandolf*, *Grafo de Kuenburg*, konstruigis la nunan pilgrimpreĝejon, kiun li konsekris en 1674. La originalon li venigis 1732 el Aŭgsburgo por anstataŭi la kopion. Laŭ votajo, se urbo kaj lando de Salzburgo restos liberaj de malamika invado dum la hispana hereda milito, la salzburga ĉefepiskopa kanonikaro farigis du orajn kronojn por la mirakla bildo, kiujn *Papo Benedikto XIV* konsekris; en 1751 okazis la solena kronado. Per dekreto de 1951 *Papo Pio XII* altigis la pilgrimpreĝejon je *Baziliko Minora*.

Laŭ „Pilgrimejoj”, eld. de AKLE-Sekcio Salzburgo.

LA VOĈO DE AMERIKO ELSENDOS TRI PROGRAMOJN EN ESPERANTO EN JUNIO KAJ JULIO

La Voĉo de Ameriko preparas serion de tri radio-programoj en Esperanto elsendotaj en tri sinsekvaj vendredoj, la 24-an de Junio, la 1-an de Julio kaj la 8-an de Julio 1960. Ĉiu 30-minuta programo estos disaŭdigata trifoje por atingi diversajn partojn de la mondo. Unu enhavos informojn pri eduko kaj lernejoj en Usono, ĉar tio estas temo, pri kiu alvenis multaj demandoj el la tuta mondo, ankaŭ novan parton en la rubriko „Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko” kaj eble intervjuon. La aliaj du programoj estos ripetoj de la programoj de la 1-a kaj 8-a de Aprilo, kiujn multaj aŭskultantoj ne sukcesis ricevi. La 1-an de Aprilo magnetaj disturboj en la ionosfero malebligis kontentigan ricevon de mallongondaj programoj en preskaŭ la tuta mondo. La 8-an de Aprilo pro teknikaj kaŭzoj la Esperanto-programo ne troviĝis sur du el la kvar ondlongoj anoncitaj.

En la tri vendredoj la Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko estos aŭdebla je la 11-a (laŭ la horsistemo de Greenwich) sur la ondlongo de 41.90 metroj (7160 kilocikloj), ĉefe en Orienta Azio, je la 12-a sur la ondlongo de 19.72 metroj (15210 kcs), ĉefe en Sudorienta Azio, Madagaskaro ktp., je la 22-a sur la ondlongoj de 31.19 metroj (9620 kcs) kaj 25.22 metroj (11895 kcs), en Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko, ankaŭ en kelkaj amerikaj landoj. La diversaj programoj ankaŭ estas aŭdeblaj en aliaj partoj de la mondo.

La 24-an de Junio la Voĉo de Ameriko prezentos literaturan programon, „La Usona Romano kaj Ĝia Tradicio”, kun elĉerpaĵoj el libro de Richard Chase, intervjuon kun D-ro Stephen Zamenhof, Profesoro de Biokemio en la Medicina Fakultato de la Columbia-Universitato en New York, pri D-ro L. L. Zamenhof (lia onklo) kaj la Zamenhof-familio, intervjuon kun S-ino Connie Davis pri Esperanto-kursoj en lernejoj por plenkreskuloj, intervjuon de Clare Sponis kun C. Stanley Otto pri la Skolta Esperantista Ligo, kaj respondojn al demandoj pri Esperanto en Usono.

La 1-an de Julio diskutrondo pritraktos la Usonian Ekonomian Sistemon. Partoprenos Reed Irvine, de la Federacia Rezerv-Banka Sistemo, Gadsden Shand, de la Esplora Fakto de la Registara Oficejo pri Malgrandaj Entreprenoj, Thomas Adler Goldman, de la Kompanio por Ekonomia kaj Industria Esploro, kaj D-ro William Solzbacher, de la Voĉo de Ameriko. En la Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko Mark Starr respondos al du demandoj pri la manko de grava socialdemokrata partio en Usono. Aliajn demandojn respondos la regulaj kunlaborantoj de la programo: F-ino Clare Sponis, F-ino Eve-Marie Solzbacher, S-ro John Petraitis kaj D-ro William Solzbacher.

La 8-an de Julio la Voĉo de Ameriko disaŭdigos programon pri la Usona Eduka Sistemo, alian programon en la rubriko de la Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko kaj verŝajne intervjuon kun eksterlanda eminentulo vizitanta Usonon. Raportojn pri la ricevo kaj opiniesprimojn pri la enhavo oni sendu al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528, HEW, Washington 25, D.C., Usono. Bonvolu ne plu sendi demandojn por la rubriko Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko, ĉar la Voĉo de Ameriko ricevis pli ol 350 demandojn de Esperantistoj el la tuta mondo.

LA SANKTA KALIKO DE LA VESPERMANĜO - III

Kiam la Kaliko venis al Valencio?

23 jarojn post kiam la reĝo Marteno ricevis la S. Relikvon en la palaco de la *Aljaferia* de la aragona ĉefurbo *Zaragozo*, la reĝo *Alfonso V, el Magnánimo* (la grandanima), portis ĝin al Valencio, kaj deponis ĝin en la kapelon de la reĝa palaco; sed la tagon antaŭ sia foriro por konkeri Naplon, li ordonis transloki la S. Kalikon kaj la ceterajn altvalorajn relikvojn al la sakristio de la katedralo, vera trezorejo kaj fortika monkesto.

La 18an de marto 1437, la forestanta reĝo Alfonso V ordonis al sia frato *Johano*, ke li lasu ĉiujn relikvojn definitive sub la gardo kaj zorgo de la kanonikaro por publika honorado, laŭ akto enregistrita de *Jaime Pastor* en la volumo 3532 de la katedrala arkivo, el kio oni deduktas, ke la S. Kaliko de la Vespermanĝo restas en la katedralo de Valencio ek de la ĵus citita dato.

Jen la inventaro de la transdono: „Leda skatolo garnita, enhavanta la S. Kalikon en kiu Jesuo Kristo konsekris la jaŭdon de la Vespermanĝo, kaj kiu konsistas el vazo, bazo, kaj du ansoj. La bazo estas garniturita ĉirkaŭe per oro, kaj ornamita per du diamantoj (nuntempe 2 grenatoj), kaj du smeraldoj, kaj per 28 perloj, grandaj kiel pizoj. La ansoj estas el oro kaj agato.” Kaj ĝi finiĝas:

„Kun tiel aŭtentaj kaj legitimaj dokumentoj posedas la Katedralo de Valencio tiun ĉi grandiozan Relikvon” (Guia... paĝ. 371 k. s.)

La plej gravaj okazaĵoj datoj de la migrado:

De Jerusalemo al Romo, kun S. Petro.

De Romo al Huesca (Hispanujo) en la jaro 258.

De Huesca al la Monaĥejo de S. Johano de la Roko en 713.

De Sankta Johano de la Roko al Zaragozo en verŝajne 1399.

De Zaragozo al la reĝa Palaco de Valencio, en 1422.

De la reĝa Palaco de Valencio al la katedralo en 1437.

De Valencio al Alicante en Marto 1809, kion motivis la franca invado.

De Alicante al Valencio en Februaro de 1810.

De Valencio al Ibiza (Baleara Insulo) en Marto 1810.

De Ibiza al Palma de Mallorca (ĉefurbo de la Balearaj insuloj) en Februaro 1812.

De Palma de Mallorca al Valencio en Septembro 1813. (Arkivo de la katedralo de Valencio).

De Valencio al la urbo Carlet de la valencia provinco okaze de la enlanda milito, la 20an de Junio 1937.

De Carlet al la katedralo de Valencio, la 9an de Julio 1939.

Jubileaj Festoj.

Koincide kun la XVIIa jarcento de la alveno al Hispanujo de la S. Relikvo, kaj de la martirigo de S. Laŭrenco, naskiĝinta en Huesca, patrono de tiu urbo, kaj al kiu oni ŝuldas la restadon de la S. Kaliko en Hispanujo, oni celebris eksterordinarajn festojn tiel en la valencia regiono, kiel en la aragona.

Tiucele, la S. Relikvo estis transportata, de Valencio al Huesca, kaj poste al la Monaĥejo de S. Johano de la Roko, kaj al pluraj aragonaj urboj.

Kiel kristanoj kaj hispanoj ni ŝuldas al la S. Kaliko de la Vespermanĝo kulton kaj honoradon, kaj plej profundan amon; fiere kaj ĝoje ni montras ĝin al la multenombraj pilgrimantoj, venantaj de la plej malproksimaj anguloj de la mondo, por honori la unikan S. Relikvon.

Dro. Ernesto Tudela, Valencio, Hispanujo.

UNUECA TEKSTO DE LA ĈEFAJ PREĜOJ — 3

La ekkanto de gloro

I
 Gloro al la Patro,
 kaj al la Filo,
 kaj al
 la Spirito Sankta-
 Kiel estis
 en la komenco,
 nun (estu)
 kaj ĉiam,
 kaj en la centoj
 da centjaroj.
 Amen.
 L. de Beaufront,
 1893 kaj 1902

II
 Gloro al Patro,
 kaj al Filo
 kaj al
 Spirito Sankta.
 Kiel estis li
 en la komenco,
 kaj nun
 kaj ĉiam,
 kaj en miljaroj
 de miljaroj.
 Amen.
 E. Peltier, 1907

III
 Gloro al Patro,
 kaj al Filo,
 kaj al
 Spirito sankta.
 Kiel estis
 en la komenco,
 kaj nun,
 kaj ĉiam,
 kaj en miljaroj
 da miljaroj.
 Amen.
 P-ro Polikarpo,
 1911

IV
 Gloro al Patro,
 kaj al Filo,
 kaj al
 la Spirito Sankta:
 kiel estis
 en la komenco,
 kaj estas nun,
 kaj estos ĉiam,
 kaj en miljarojn
 da miljaroj.
 Amen.
 P. M. Carolfi, 1922

V
 Gloro al la Patro,
 kaj al la Filo,
 kaj al
 la Spirito Sankta.
 Kiel estis
 en la komenco,
 kaj estas nun
 kaj estos ĉiam,
 kaj dum centjaroj
 da centjaroj.
 Amen.
 F. Meŝtan, 1924
 L. Thalmaier, 1949

VI
 Gloro al la Patro,
 kaj la Filo,
 kaj
 la Sankta Spirito.
 Kiel estis
 en la komenco,
 kaj nun,
 kaj ĉiam,
 kaj en jarcentoj
 de jarcentoj.
 Amen.

En VI ni donas nian proponon. Per la sekvantaj notoj ni kaptas la okazon ekspliki la ĉefajn variaĵojn.

1) La forlaso de la artikolo antaŭ Patro, Filo, Sankta Spirito ŝajnas al ni nerekomendinda, ĉar temas precize pri tiu Patro ktp.

La ripeto de la prepozicio *al* ŝajnas superflua kaj la forlaso favora al la ritmo.

2) Pro tio, ke ni en Esperanto ĝenerale metas adjektivon antaŭ la substantivon, la formo *Sankta Spirito* ŝajnas al ni elektinda.

Ĉar ambaŭ vortoj apartenas al propra nomo en ambaŭ majusklo estu uzata.

3) La formo *kaj estas nun, kaj estos ĉiam* de P. M. Carolfi, 1922 certe estas pli detala; *kaj nun, kaj ĉiam* estas pli facile prononcebla. En 1931 kaj 1948 P-ro Carolfi la pli lastan preferis.

4) La plej grandaj diferencoj troviĝas en la lasta parto; ni ne jam indikis ĉiujn. G. Ramboux A. A. (1929) proponis: *en jarcentoj de jarcentoj*; P-ro Carolfi (1931, 1948): *en la jarcentoj de l' jarcentoj*.

La uzo de la artikolo ŝajnas nenecesa. Same *da* ne taŭgas, ĉar ne temas pri kvanto, sed pri kvalito.

5) La termino *miljaro* estas zamenhofa. Pro la frazo „Forte staras muroj de miljaroj” en „La Espero” ni ĉiuj konas ĝin.

En Fundamento de Esperanto (ekzerco 14,5) Zamenhof donas eksplikon per ekzemplo: „mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron”.

La esprimo posedas iom tiklan historion laŭ noto de G. Waringhien en sia libro „Lingvo kaj vivo” (La Laguna, 1959,86) ĉe la konstato, ke de 1905 nia Fundamento restis netuŝita: „krom du esceptoj: ĉe ĉiuj eldonoj provizitaj de la Esperantista Centra Librejo, ekde la 5a en 1918, tre bedaŭrinda preteratento enmetis du ŝanĝojn, kiujn De Beaufront antaŭe iniciatis en sia privata eldono de la Ekzercaro: ĉe 14,5 oni ŝanĝis *miljaron* al *jarmilon* kaj ĉe 36,7 oni ŝanĝis *mia frato kaj fratino* al *miaj frato kaj fratino*. La eldono de la Fundamenta Krestomatio farita de la Londona The Esperanto Publishing Co forigis tiujn atencojn.”

La rimarkigo de G. Waringhien estas ne tute ĝusta! En la 9a eldono de Fundamenta Krestomatio en 1922 de la sama Librejo troviĝas *miljaron*; sed la 6a eldono de Fundamento de Esperanto en 1925 ankoraŭ posedas: *jarmilon*.

Kvankam G. Waringhien prave konstatas, ke tiu aliigo estis atenco, Zamenhof eraris farante la terminon *miljaron*!

Pri tio detale skribis Petro Stojan en „Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto” (Brugge, 1953, 93-95), el kiu libreto ni prenas kelkajn frazojn: „La senfina disputado pri miljaro-jarmilo donas tipan ekzemplon de la senprincipa hezitado. Valoras halti kaj funde esplori la problemon... Zamenhof... konfuzige formis: centjaro = cent jaroj; miljaro = mil jaroj. Evidentas ke centjaro pli logike devus signifi: centa jaro, la jaro de centjara jubileo k.s.... ni estu konsekvence logikaj kaj uzu: jarcento, jarmilo...”

Zamenhof mem korektis sian opinion, kiel montriĝas en sia traduko „Fabeloj” de Andersen (III,12), kie tekstas: „La legendo diras, ke tiu birdo havas sian neston en Arabujo kaj en ĉiu centa jaro mem sin forbruligas en sia nesto... Ho vi paradiza birdo, ĉiucentjare renovigata...”

Koncerne la terminon de Beaufront do pravas, kaj same prave W. J. Downes en la plej nova eldono de Fundamenta Krestomatio ĉe la termino *miljaron* donas plibonigan noton: *jarmilon*. (1954, 3, 254).

Konsekvence ni do uzu en nia preĝo *jarcentoj*. Krome ni fidele konstata, ke jam en 1893 en la unua katolika preĝlibro L. de Beaufront tiel uzis tiun ĉi saman terminon, kaj ke Zamenhof mem bonvolis trarigardi tiun eldonon!

La kristana saluto

En la kristana saluto unu malgranda diferenco montriĝas:

- 1) Laŭdata estu Jesu-Kristo. En eternon. Amen. P-ro Carolfi, 1922.
 - 2) Laŭdata estu Jesuo Kristo. En eternon. Amen. F. Meŝtan, 1924.
 - 3) Laŭdata estu Jesu Kristo. En eternon. Amen. H. G. Wannemakers S.J., 1952.
- Ni jam eksplikis kaj argumentis kial la formo *Jesu Kristo* estas preferinda. (E.K. 1955, 10-11).

La Krucosigno

Kiel unua L. de Beaufront proponis en 1893 la tekston de la krucosigno: „En la nomo de l' Patro, kaj de l' Filo, kaj de l' Spirito Sankta. Amen”. Senŝanĝe tiu ĉi teksto troviĝas en la 2a eldono de lia preĝlibro en 1902.

En postaj preĝaroj temas precipe pri du variaĵoj:

a) anstataŭ *de l' troviĝas de la*.

b) anstataŭ *Spirito Sankta troviĝas Sankta Spirito*.

a) Estas rimarkinde, ke la teksto kun *de l' troviĝas* en ĉiuj preĝlibroj antaŭ 1924 kaj krome estas la plej ofte uzata post 1924!

La unueca teksto de 1924 estas la unua, kiu proponas: „En la nomo de la Patro, kaj de la Filo, kaj de la Spirito Sankta. Amen.” La saman tekston prenis L. Thalmaier en 1949 kaj 1955.

Ni iom bedaŭras, ke la tiama komisiono ne prenis la jam unuecan tekston de la antaŭaj preĝlibroj, ĉar nia opinio mankas sufiĉa kialo por tiu aliigo.

b) Certe por konservi la sinsekvon de la latina esprimo pluraj preĝlibroj uzas *Spirito Sankta*, kvankam jam en 1907 E. Peltier foje jam uzis *Sankta Spirito*. Tiel faris en 1913 Fr. de P. Clemente, G. Ramboux A.A. en 1929 kaj Tutmonda Laŭdo en 1952.

Por la argumento pri *Sankta Spirito* vidu ĉe „La ekkanto de gloro” noto 2).

Kiel unuecan tekston ni tial proponas: „En la nomo de l' Patro, kaj de l' Filo, kaj de l' Sankta Spirito. Amen”.

daŭrigota

H. G. Wannemakers S.J.

Laŭdon al Dio

LA LEGANTO PAROLAS

Saluton Mario

La lerta kaj ne laciĝanta aŭtoro de „unueca teksto” plene meritas, ke liaj detale ellaboritaj artikoloj estu pripensataj kaj diskutataj. La konscia komparo de tiom da tekstoj kaj la fina sumigo de la uzataj vortoj enigis la ideon, ke la diversaj komponantoj ankaŭ nur post ekzakta ekzameno kaj komparo de ĉiuj ebloj presigis la preĝojn kaj ke pro tio la nombro de la samaj vortoj uzitaj ege valoras. La vero tamen estas, ke tiu vorto kiel plej ĝusta estas akceptita, kiu laŭ enhavo kaj ritma harmonio al la tuto de la teksto konvenas. Ankaŭ tie ĉi multaj vojoj kondukas al Romo. Iu fundata opinio estas ebla, sen ke alia redakcio estu kondamnata.

Kiam en la jaro 1924 dum varmega posttagmezo la komisiono konsistanta el pastro Poell, p. Meŝtan, sro Schamanek kaj subskribonto estis invitataj supreniri al iu Haga ĉambro por finlabori la taskon havigi al la katolika esperantistaro fiksitajn tekstojn de Patro Nia, Saluton Mario, Apostola Kredkonfeso, ni tiam sen plua diskuto elektis en la Saluton Mario:

1. Korpo, ĉar tiutempe la oficiala nederlanda traduko estis „vrucht Uws lichaams” kaj ĉar korpo ŝajnis al ni tre klara.

2. Sendube sonas emocie pro esprimo de unueco inter pilgrimantoj en Lurdo, kiam en la lingvo de la Eklezio estas kantata Ave Maria. Nun tamen temas pri esperanta teksto por la esperantistaro. Tiel ni akceptis Saluton Mario. Naciaj lingvoj karakterizas la Ave per: nederlande: Wees gegroet; france: Je vous salue; germane: Gegrüsst seist du ktp.

3. Mario. Kial ne? ĉu la fino o por virinoj ne plaĉas? Estas en konkordo kun fundamento. Plie, en aliaj lingvoj ekzistas: Hero, Sapho ktp.

4. Di' patrino. Sonas flue kaj intime kaj afable kaj bone harmonias kun la resto. Ĉu Di' malofte renkontiĝas? Se tio estus, kia malhelpo? Se esperantisto laŭ-

fundamente verkas li ne estas riproĉebla. Antaŭ ne longe „far” estis apenaŭ konata, nun honore al p. Wannemakers, ĝi estas rajte uzata, ĉar fundamente bona. Sed ĉu Di’ vere malofta? Tralegu nur supraĵe poezion en la fundamenta Krestomatio kaj vi trovos: Gardu lin Di’ (L. Zamenhof) Se donas Di’ (L. Zamenhof) — Kun Di’ Pri Di’ (Devjatnin) — Al Di’ (Goldberg) ktp.

Restas multaj ankaŭ ne kondamneblaj tekstoj por la preĝoj, sed unueco neniam fariĝos, se ne iu aŭtoritato decidos.

Callixtus Preller O.P., Venlo, Nederlando

Noto de la Redakcio: Ni volonte publikigis la supran artikolon de patro Preller, pro tio ke li siatempe kunlaboris por la unueca teksto de niaj ĉefaj preĝoj.

Pluaj rimarkoj estas bonvenaj, bonvolu sendi tiujn al *patro H.G.Wannemakers S.J. Laan 27, den Haag, Nederlando.*

Ili estos pridiskutataj en la sacerdota kunveno en Munkeno.

P R E Ĝ A D O

Se iu ne estas religia homo de naturo aŭ pro sia eduko, eĉ se li estas plena skeptikulo: la preĝo tamen kapablas pli, multe pli, helpi ol li volas kredi, ĉar ĝi estas io praktika. Kun „praktika” mi opinias, ke preĝo plenumas jenajn tri fundamentajn animajn necesojn, kiujn ĉiuj havas, ĉu kredantaj Dion aŭ ne:

1. Preĝado helpas al ni formi precize en vortoj tion, kio nin turmentas. Estas preskaŭ neeble solvi problemon tiel longe kiel ĝi restas malklara kaj malpreciza. Preĝado estas en sia maniero simila al procedo de skribado malfacilaĵojn per inko kaj plumo. Kiam ni petas helpon — ankaŭ helpon de Dio — el iu malfacilaĵo, ni devas formi la peton en vortoj.

2. Preĝado donas al ni la senton, ke ni dividas nian ŝarĝon kun iu, ke ni ne estas solaj. Malmultaj estas tiel fortaj, ke ili povas porti tute solaj la plej pezajn ŝarĝojn, la plej turmentajn zorgojn. Kelkfoje estas niaj afliktoj tiel intimaj, ke ni ne povas diskuti ilin eĉ kun niaj plej proksimaj parencoj kaj amikoj. Tiam estas tempo por preĝado. Ĉiu psikiatro scias, ke estas utile, rakonti al iu niajn zorgojn kaj timojn, kiam ni fariĝis nervaj kaj incititaj. Ankaŭ kiam ni ne havas iun, al kiu ni povas konfidi nin — Dion ni havas ĉiam!

3. Ĉe preĝado ekestas aktiva principo. Ĝi estas la unua paŝo al ago. Mi dubas, ĉu iu povas preĝi tagon post tago por io sen frukto, alivorte: sen iu propra faro? *D-ro Aleksandro Carrell* diris: „Preĝo estas la plej potenca formo de energio, kiun oni povas produkti. Kial ni ne profitus de tio?”

Unu el la eminentaj psikiatroj, *d-ro C. G. Jung*, diris en sia artikolo „La interrilatoj de la psikoterapio al la animzorgo”: „Ek de 30 jaroj mi havas klientaron el ĉiuj kulturlandoj de la tero. Multajn centojn da pacientoj mi kuracis: estis la plimulto protestantoj, pli malmulte da judoj kaj ne pli ol kvin aŭ ses praktikantaj katolikoj.

El Dale Carnegie: How to stop worrying and start living?

El germana eldono trad. Stefano Maul, kun permeso de la eldonisto.

La idealo de la katolikaj esperantistoj estas profunde homama kaj fundamente kristana.

Kardinalo Jakobo Lercaro, ĉefepiskopo de Bologna, Italujo.



Baldur Ragnarsson: ŜTUPOJ SEN NOMO. — Prologo de *J. Régulo Pérez.* — Dekoracioj de *Pablo Picasso.* — Kovrilo de *John Hartley.* — Vinjeto de *Mads Stage.* — *STAFETO: Beletraj Kajeroj, 1.* — *J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1959.* — 19 × 12 cm. — 128 paĝoj. — Prezo 4 ned. guld. = 16 steloj + afranko. Kontraŭkute mi supersaltis la 7-paĝan prologon kaj tuj komencis legi la poemojn. Du-tri mi povis legi, sed la ceteraj, kun kelkaj esceptoj, estis por mi same nekompreneblaj kiel la ilustraĵoj de Picasso. Ĉar la poemoj estas „sen nomo”, portante nur

ciferojn anstataŭ titoloj, ankaŭ tie mi ne trovis helpon por diveni la sencon! Konkludo: aŭ mi ne sufiĉe scias Esperanton, aŭ la poeto trovis nian lingvon tro simpla kaj „pliriĉigis” ĝin. Certe la kajero estas destinata nur al tre kleraj homoj (la fakto ke la grekaj vortoj en la teksto eĉ ne estas klarigitaj konfirmas min en tiu opinio) kaj mi esperas ke troviĝas sufiĉe da ili inter niaj samideanoj por ke la eldonisto povu vendi la stokon! Do poste mi legis la longan prologon, el kiu montriĝas, ke la verketo vagadis dum jaroj de unu lando al alia, por akiri enkondukan eseon. La granda *William Auld* alte taksante la enhavon, promesis fari ĝin, sed li malsaniĝis; kaj finfine, post kiam „dum tiu tien-reen-irado... ĝi suferis vere drastajn purigojn, reĝustigojn, novordigojn, aldonojn, forigojn, kiuj profunde transformis ĝin” la eldonisto mem verkis la prologon, ne sciante „ĉu tiu manipulado ĝin pliriĉigis aŭ ne”. Ankaŭ nia eminenta *Kalocsay* tralegis la manuskripton, kaj mi vere ĝojis legante lian verdikton, kiu dum la tua legado ŝvebis en *mia* cerbo: „... eble ĝi estas io grandioza, por kies apreco mi estas tro stulta aŭ tro maljuna”. Povas esti, ke profunda pristudo klarigos la tekston, sed vere mi povas pli bone uzi mian tempon farante pli simplan, sed espereble pli utilan laboron por nia movado! La „infanaj” desegnoj de Picasso estas laŭ *mia* gusto teruraj, sed pri gusto oni ne povas diskuti...

Reto Rossetti: PINTA KRAJONO. — Antaŭvortoj de *Geraldo Mattos.* Dekoracioj de *Paul Klee.* Kovrilo de *John Hartley.* Vinjeto de *Mads Stage.* *STAFETO: Beletraj Kajeroj no. 2.* — Eld. *J. Régulo, La Laguno, Teneriĝo, Kanariaj Insuloj, 1959.* 19 × 12 cm. — 128 numeritaj + 8 nenumeritaj paĝoj. Prezo: 4 gld. = 16 steloj.

La jam bone konata, lerta kaj sprita poeto prezentas al ni altvaloran poemaron. Diversspecaj etaj poemoj estas veraj juveletoj; ankaŭ mi vere ne scias, kion mi devus admiri pli: la „Variantojn”, en kiu Rossetti imitas la stilon de pluraj konataj Esperanto-poetoj: Schwarz, Kalocsay, Baghy, Kurzens kaj Mihalski por traduki la saman poemon el la angla lingvo, aŭ la grandan jubilean eposon, en kiu li majstre priskribas la historion de nia movado, la kongresojn, la diversajn eminentulojn... Vi mem malrapide gustumu la frandaĵojn kaj formu propran juĝon! Nur estas bedaŭrinde, ke Rossetti insistas ke la homo estas malperfekta simio: tiuj paĝoj ne estas ĝindaj pro la evidenta malestimo al la homa raso: aŭ ĉu li volis esti sprita? Malgraŭ tio la verketo estas tre rekomendinda, kaj ĝi certe al la plej multaj esperantistoj pli plaĉos ol la „Ŝtupoj sen nomo”!

Kenneth G. Linton: KANAKO EL KANANAM. Originale verkita en bonega Esperanto. Por detaloj vidu la prospekton. — Kiel ĉiuj eldonoj de *The Esperanto Publishing Co., Rickmansworth* la libro estas bonege prizorgita laŭ la

aspekto, kiu indas la enhavon. La aŭtoro scias priskribi tiel vigle la tropikajn florojn, birdojn, fiŝojn en iliaj brilaj koloroj, ke oni ekhavas tre bonan imagon pri tiuj mirindaĵoj, kiujn la leganto kvazaŭ mem vidas. Precipe en tempo, kiam en kelkaj lokoj furiozas la stulta rasbatalo, agrable tuŝas nin la vere amikaj sentoj por kunhomoj, kiuj ne nur havas alian haŭtkoloron, sed ankaŭ ne konas nian kulturon. Precipe pro la studo de la enlanda interdialekta lingvo, la aŭtoro povis pli bone esplori la karakteron de la indiĝenoj kaj akiri la konvinkon, ke ankaŭ inter primitivaj rasoj ekzistas honestaj kaj amkapablaj koroj. Ne mirinde, ke li kun aro da ili amikiĝis! Gratulon al aŭtoro kaj eldonisto pro tiu vere tre rekomendinda verko!

W. A. Gething, O.B.E., B. Sc. (Econ.), F.B.E.A. : ESSENTIAL ESPERANTO. Lernolibro por komencantoj, en angla lingvo. Eldonis: W. Foulsham & Co. Ltd., London, New York, Toronto, Cape Town, Sydney. 19 x 12.5 cm. 128 pĝ. Tutkola bindo kun orsurpresoj. Prezo 8sh. 6d. (5,10 ned. guld.) — Post ekspliko fare de s-ro J. W. Leslie, F.B.E.A., sekretario de la Brita Esperanto-Asocio, pri la neceso de internacia lingvo, kaj de la motivoj kiujn D-ro Zamenhof instigis al la kreo de Esperanto, kaj enkonduko de la klera verkinto mem, sekvas la studplano: la intenco de la verkinto estas, doni plej klaran skizon pri la konstruo de Esperanto. Li elektis prefere vortojn, kiuj estas preskaŭ samaj en angla kaj internacia lingvoj, kio multe faciligos la studadon de la komencanto. Sinsekve li pritraktas la prononcon kaj la diversajn gramatikajn regulojn, kun helpo de klaraj ekzemploj en simplaj frazoj. Aro da mallongaj ekzercaĵoj kaj vortlisto kompletigas la laŭ ni bonegan lernolibron por anglalingvanoj, kiuj certe, post ĉi tiu esenca unua studo, sentos la apetiton por pliprofundigi sian scion pri Esperanto. *

Truus Durenkamp.



W. Auld: La internacia lingvo kiel belarta tradukilo. en: Esperanto UEA, 1959, 163-165; 183-187; 1960, 3-8.

F. I. Kolobanov: Tolstoj, Zamenhof kaj Esperanto. (mallongigita traduko de I.L.). en: Esperanto UEA, 1959, 220-222.

La I.K.I.-Komitato: Grava apliko de Esperanto dum 25 jaroj. en: Heroldo de Esperanto, 1959, nro 14(1292) — traduko en itala lingvo en: Katolika Sento, 1960, jan. nro.

W. Auld: La belartoj en la 20a jarcento... Kial entute la poezio? en: The British Esperantist, 1960, 184-185.

R. Rossetti: Notoj pri la Esperanta literaturo. en: The British Esperantist, 1960, 200

N I G R A K A T O

Velura kvarpieda floro —
Sed floro, kiu mole saltas —
Pro sano via pelto brilas.
Do, kiu nun insiste stultas
Diri — „Jen nigro, ne koloro“?

Sen amo kaj sen intelekto,
Gracie kaj aplombe vi
En via memsufiĉ' trankvilas,
En via mova melodi',
En besta simpla kaj perfekto.

Marjorie Boulton. El: KONTRALTE.



LI NE PLU KURAGIS

— Mi kondamnas vin al pago de dek guldonoj pro ofendo de la plendinto.

Ĉu vi deziras diri ankoraŭ ion, akuzito?

— Certe, sinjoro juĝisto, sed tio sendube kostus multe pli!

ENIGMA SURSKRIBO

La parencoj mendis grandan funebran florkronon, ornamitan per rubando, kiu devos porti jenan surskribon: „Pace ripozu - Ĝis revido”. Poste oni diskutis pri la teksto en la familia rondo, kaj decidis ion aldoni, se estus ankoraŭ loko sur la rubando. Tial unu el ili telefonis kun la floristo:

— Bonvolu aldoni sur la rubando: „en la ĉielo” se ankoraŭ estos loko.

— Mi prizorgos tion, sinjoro.

Dum la enterigo oni povis legi jenan enigman surskribon:

„Pace ripozu — Ĝis revido en la ĉielo se ankoraŭ estos loko.”

LA ERARO

Konfesantino akuzas sin, ke ŝi dum longa tempo rigardis en la spegulo, kaj trovis sin bela.

La konfesanto rigardas la fraŭlinon kaj diras:

— Ne maltrankviliĝu, filino mia, tio ne estas peko, sed eraro...

VORT-ŜTUPARO.

- 1. p . o
- 2. p . . o
- 3. p . . . o
- 4. p o
- 5. p o
- 6. p o
- 7. p o
- 8. p o
- 9. p o
- 10. p o
- 11. p o
- 12. p o

- 1. prepozicio. 2. frukto. 3. arbo.
- 4. templo. 5. insekto. 6. kovraĵo de la okulo.
- 7. parto de la jaro. 8. speciala rajto.
- 9. arto prepari artajn fajraĵojn. 10. elementara scienco kaj la metodo instrui ĝin.
- 11. kvarangulo, kies kontraŭaj flankoj estas paralelaj.
- 12. religio.

Li de Jong-Roobeek.

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO p. 98.

Horizontale:

- A. skarabo; makul. B. kukum; brave. C. orumi; tenil. D. rizo; kuzino.
- E. kuzo; an. F. uragan; najad. G. tamen; raket. H. sinapo; grip. I. kuler; aort.
- J. rat; ordon; iom. K. ok. L. kveri; botanik. M. salik; apanaĝo. N. irido; leviĝ.
- O. metano; rokego. P. al; kol; jes.

Vertikale:

- I. skorbut; proksima. II. kuri; ras; akvarel. III. akuz; amikt; elit. IV. rumo, genu; bridaj.
- V. ami; kanalo; ikon. VI. kun; per. VII. obtuz; ord; bal. VIII. rezon; opero.
- IX. mani; argan; tavolo. X. avin; jaro; panik. XI. kelo; akiri, naĝej.
- XII. adepto; iĝ; ge. XIII. lagun; kolos.



Nova metodo por varbado! Novaj, ne-refuteblaj argumentoj. La varbito poste neniam seniluziiĝos. Varbilo kun instrukcioj: 5 intern. respondkuponoj.

Adreso: *Esperanto-propagando*, Poŝt-fako 212, LUND, Svedujo. *

Mi kolektas la diverslandajn seriojn da poŝtmarkoj por la rifiĝintoj. Sendu

al mi kun propono pri rekompenco. S-ino *A. Sinnema-de Vetten*, Oostdorperweg 88, WASSENAAR, Nederlando. *

Kiuj gesamideanoj deziras babili kun mi letere aŭ per magnetofona sonbendo pri diversaj vivproblemoj aŭ okazajoj, religiaj aferoj kaj turismo per motoreta biciklo? Mi estas 49-jara, edziĝinta ĉefpordisto. *Gerhard Wagner*, Am Mühlberg, (14a) MARKGROENINGEN, Germanujo. *

Esperantistoj, partoprenontaj al la *konstruordeno en Holbach*, Germanujo, de 22 julio - 13 aŭg., sciigu tion tuj al s-ro *P. Gommers*, Molenweg 213, Vierlingsbeek (N.Br.), Nederlando. *

Por propagandcela ekspozicio pri stratoj, placoj kaj monumentoj kun la nomoj Zamenhof aŭ Esperanto mi urĝe bezonas fotojn, sur kiuj ankaŭ la nomtabulo estas bone videbla. Rekompenco laŭ deziro. Sendu la fotojn al f-ino *Annemarie Orterer*, (13b) *Enterbach 86*, Post Rottach-Egern am Tegernsee, Germanujo.

Jarlibro 1960

Listo de la sacerdotoj:

Stefano Vuĉemilo ofm. Put zrtava fasizma 1, *Makarska*, Jugoslavio.

Bernardo Rubiniĉ, Terc. O. S. Franc. Jandriĉeva 21, *Zagreb*, Jugoslavio.

Oleń Szczepaniak, *Gutowo Mate*, p. *Wrzesnia*, w. *Poznanskie*, Polujo.

Listo de la Konsuloj:

Francujo: *Châteauroux - Indre* - (40.000): s-ro *P. Soulet*, 20, rue *Bernardin*; katehismo-instruisto.

Germanujo: *Stolberg Rhld.* (37.000): S-ro *Hans Siffrin*, muzikinstruisto, *Kraustr.* 1, telef. 2620. Grupkunveno ĉiun jaŭdon je la sama adreso.

Hispanujo: *Sama de Langreo (Asturias)*: S-ro *Sacramento Collado Llana*, A. *Delbrouck* 4 - 1°.

Portugalujo: *Lisboa*: S-ro D-ro *Eduardo Antonio Pestana*, *Rua Coelho da Rocha* 16-2° esq. juraferoj.

Svedujo, *Lund* (34.000): s-ro *I. K. Kovarcz*, poŝtkesto 212.

Nova subtenanta membro:

S-ro *Paul Scherer*, *Emmenbrücke*, Svisujo.

Biblio-Fonduso

Antaŭa sumo 1460,21; J. W. el H., Germanujo 2,—; B. A. el H., Nederlando 25,—; J. H. S. el C., Usono 9,50; G. F. el S-A., Sarlando 4,50; P. T. el B. A., Argentino 10,—; entute 1511,21.

Al ĉiuj donacintoj nian koran dankon!



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

Dimanĉe: Panoramo de internaciaj eventoj kaj esp. magazino; rubriketo por infanoj.

Lunde: Felietono pri diversaj temoj; ĉiun duan semajnon: Scienca tribunon.

Marde: Prezento de pola muziko; unuan mardon de la monato: anguleto por blindaj esperantistoj.

Merkrede: Kultura kroniko kaj Koncerto kun bondeziroj.

Ĵaŭde: Aktualaj temoj kaj Leterkesto kun redakcia respondo al aŭskultantoj.

Vendrede: Literatura rubriko kun fragmentoj el la esperanta literaturo.

Sabate: Revuo pri okazintaĵoj en Pollando en la koncerna semajno.

Raportu pri la ricevo kaj samtempe petu senpagan alsendon de bele ilustrita prospekto en Esperanto, eldonita okaze de la 15-jara Pola Radio. *Adreso:* Pola Radio, Esperantaj Disaŭdigoj, *Varsovio, Pollando.*

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96.

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;

merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

J U N I O 1 9 6 0 .

1: Kuriero de Esperanto; 3: La Internacia Specimenfoiro de Milano; 7: Tra la literaturo; 8: Kuriero de Esperanto; 10: Leterkesto kaj bibliografio; 14: La itala verkisto Orio Vergani; 15: Kuriero de Esperanto; 17: Novajoj el Italujo; 21: Italaj kanzonoj en Esperanto; 22: Kuriero de Esperanto; 24: La socia poezio de Ada Negri; 28: Grandaj Sanktuloj: Sankta Vincenzo de Paŭlo; 29: Kuriero de Esperanto.

45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO-BRUSELO SOMERA UNIVERSITATO

La Estraro de U.E.A. dum sia Paska kunsido akceptis jenan programon por Bruselo de la Internacia Somera Universitato:

1. „Internacijuraj problemoj de spacveturado” de Prof. D-ro Ivo Lapenna
2. „Juraj problemoj pri atoma energio” de Prof. D-ro Marcel Roost
3. „La eŭropa angilo tute ne frajas!” de Kuratoro C. Stöp-Bowitz
4. „La belga literaturo, vidata el Francio” de Prof. Gaston Waringhien
5. „Toponimio aŭ studo de loknomoj” de Prof. D-ro W. E. Collinson
6. „Rilatoj inter Kanariaj Insuloj kaj Flandrujo” de D-ro Juan Régulo Pérez
7. „Jogo, Filozofio, celo kaj praktiko” de Lic. Tibor Sekelj
8. „Esperantaj kantoj kaj ilia komponado” de Frank Merrick, F.R.C.M.

Statistiko: ĝis fino de aprilo aliĝis 1465 kongresanoj el 41 landoj.